

La Progreso

REDACTIE-
COMITE

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.I.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT

H. KUYT

JAC. LEM JR.

J. VAN SCHEEPEN

H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

ESPERANTO KAJ SENTOJ

La plej trafa pruvo pri la „vivanteco“ de Esperanto estas la viglaj diskutoj kaj polemikoj pri la lingvo. Ni ne celas diskutojn en la lingvo pri organizaj, sociaj aŭ kiaj ajn aliaj temoj, sed *pri* la lingvo mem.

Diversaj faktoroj regas en la lingvo. Ni fieras pri la logiko, kiu laŭdire devas solvi ĉiun problemon. Ni kontentigas pri la simpla gramatiko, kiu ne prezentas ian balaston. Ni rezigne akceptas la influon de la naciaj lingvoj, kiu certagrade pliriĉigas Esperanton.

Ni konserveme eĉ defendas nelogikajn formojn kiuj jam akiris civitanan rajton, do ni akceptas ankaŭ jam la tradicion. Sed kiu pli atente observas ne la temon de prilingvaj diskutoj, sed speciale la vidpunkton de iliaj aŭtoroj kaj ilian tonon, tiu konstatas, ke ĉiujn eĉ menciitajn faktorojn superregas faktoro alia: la sentoj.

Sendube ekzistas nur unu logiko. Sed rimarku, kiel diferencaj interpretoj ekzistas pri la logiko! Kio por unu estas logike klara, tio signifas por alia sofisman rezonon. Se la logiko vere estus tiel evidenta, pro kio do tiel diferencaj vidpunktoj? Se eĉ pri la logiko ni ne samopiniaj, tiom malpli pri la aliaj faktoroj: tradicio, naciaj influoj k.t.p.

Se ni serioze konsideras tiun eĉ ŝajne strangan fenomenon, ni venas al la konkludo, ke nek la logiko nek unu el la menciitaj aliaj faktoroj ludas la ĉefan rolon en Esperanto, sed la sentoj, ĉar ĉiujn ceterajn faktorojn tiom forte influas la sentoj de la esperantistoj mem, ke ilia rolo en la lingvo ne povas esti

pura, sed intermiksita per sentoj. Eĉ en intelekta koncepto pri iu lingva temo la sentofaktoro ofte ne mankas.

Ni komprenas, ke tiun eĉ faktoron malfacile povas akcepti la esperantistoj, kiu ĝenerale tiom fieras pri sia „logika“ lingvo. Sed kiu ne estas blinda por la kvazaŭ fermentanta procezo en la evoluo de la lingvo, tiu jam ne povas ignori tiun eĉ faktoron. Kaj jam akceptinte ĝin, ni akiras pli kaj pli vastan koncepton pri tiu procezo. Ni ekkonscias, ke la diversaj problemoj, por kiuj pluraj esperanistoj pasie varmiĝis — mi aludu la *ujo-jo-aferon*, la *kvazaŭ-disputon*, la *po-rezonojn*, la *tiel-tiom-demandon* — en vero jam ne estas problemoj de plia aŭ malplia logikeco en la lingvo, sed de sentoj de tiuj, kiuj aŭ starigas aŭ eltrovis tiujn problemojn, aŭ opinias sia tasko pasie defendi aŭ ataki ilin.

Ne estas malfacile trovi la kaŭzon de tiu eĉ fenomeno de sentosuperrego. Esperanto ne estas ekzakta scienco, en kiu regas absolutaj veroj kaj faktoj. Ĝi ankaŭ ne estas teĥnika eltrovo, en kiu rolas nur faktoroj teĥnikaj kaj utilcelaj. En tiu eĉ rilato Esperanto eĉ ne estas komparebla kun naciaj lingvoj, kies uzado estas fiksita laŭ certa tradicio, kaj direktata de la praktiko. En Esperanto la faktoroj tradicio kaj praktiko ne estas jam sufiĉe firmiĝintaj por havi la saman influon en la lingvo, kiel en la naciaj lingvoj.

Tiom longe kiam ekzistas certa spaco por libera gramatikumado, por eltrovoj kaj eksperimentoj, la sentofaktoro en Esperanto superregos. Nia opinio ni povas

WERFT ABONNÉ'S VOOR ONS STUDIEBLAD

kompari Esperanton nur kun tiuj ideoj, en kiuj same ekzistas iaj faktoj kaj veroj, sed kiujn absolutaĵojn superas personaj konceptoj kaj sentoj. Tiuj ideoj estas religio kaj politiko. Nur laŭgrade la komparo lamas, ĉar en religio kaj politiko la sentoj tiom forte superregas, ke ili ofte degeneras en fanatiskon. Sed esence la ideoj estas samkarakteraj. Ankaŭ koncerne lingvajn temojn oni facile inklinas al fanatismo. En ĉiuj tiuj ideoj la kelkaj absolutaj faktoj kaj veroj facile vualigās sub nekonscie teksata reto de argumentoj kaj sofismoj, kiuj trovis sian fonton ne unuavice en la logiko, sed en la volo kaj obstino esti prava kaj laŭ tiu pravo akiri spiritan venkon. Ofte la rezona ordo ne estas „argumentoj kun rezultanta konkludo“, sed inverse: „jam fiksita opinio kun argumentoj por pravigi ĝin“.

Se oni ĝis tie ĉi povas akcepti nian rezonon, oni starigās eble kun ia timo antaŭ la demando: se la farita komparo estas ĝusta, ĉu Esperanto tiukaze iros renkonte al estonteco simila al la nuna stato de religio kaj politiko? T.e., al stato de ĥaoso kaj absoluta foresto de interkompreno?

Tian demandon ni respondu nee. Ŝue, kiel ni jam diris, nia komparo lamas koncerne gradon, ĉar Esperanto certe ne povas esti tiom forte regata de la sentofaktoro kiom religio kaj politiko. Sed krome ekzistas motivoj malpravigantaj tiun timon. Neniaj ekzistis unuforma religio, neniam ekzistis unutendenca politiko, sed ĉiam ekzistis en ambaŭ ideoj pluraj, inter si konkurantaj, eĉ malamikaj grupoj, kies unueciĝaj klopodoj konsistis nur en la deziro venki aŭ rebati la aliajn. Kontraŭe, en Esperanto ne ekzistas tia dividiteco, kaj ĝi eĉ ne povas ekzisti, ĉar tuj kiam la esperantistaro sin dividus en du grupojn sur lingva tereno, la valoro de ĉi el la du dialektoj reduktiĝas ne ĝis 50 %, sed ĝis 0. La mondo daŭrigus sian ekzistadon malgraŭ multeco de religioj kaj politikaj partioj, sed internacia lingvo povas plene plenumi sian taskon nur, se ĝi estas unu kaj nedividebla. La utileco-principo ne toleras skismon kaj nekonscie retenas la esperantistaron de dividiĝo.

Skismoj povas estiĝi, sed la historio jam sufiĉe pruvis, ke ĉiu branĉo kiu forŝiriĝis de la lingva trunko, ne havas propran ekzistopovon, tiom malpli povon por kreski, sed ĝi velkas kaj fine formortas. Ni memoru Idon, Esperantidon kaj diversajn malpli konatajn projektojn formatajn el Esperanto. Simila sorto trafus novajn skismojn.

Ne, ni ne bezonas timi dialektiĝojn. Malpravas tiuj, kiuj vidas en uzado de *je*, de *tiom* anstataŭ *tiel* aŭ en kiu ajn alia bagatelo ĝermantan skismon. Sur kiu ajn principo estas bazita la devio, ĉu sur logiko, ĉu sur personaj preferoj, finfine ĉiu devio reduktiĝas al la sentofaktoro, kiu agitas same pasie por la logiko kiel kontraŭ ĝi.

Iajn preferojn en lingvaj punktoj ni ĉiuj havas. La libereco, la spaco por liberaj opinioj en la kadro de la gramatiko, kiun permesas la Fundamento, kaŭzas tiun fakton; kaj neniu el ni povas sin liberigi el la rajto uzi tiun liberecon. Ĉu tiu libereco estas dezirinda aŭ ne, ni nun ne volas trakti; sed danĝeron ni certe ne vidas en ĝi.

Kial ni ne vidas danĝeron en la diverseco de lingvaj konceptoj? Tial, ke la spertoj de pluraj lingvoesplorantoj en Esperanto montras la samajn fazojn de evoluo: admiro por la logiko kaj la simpla gramatiko; konstato, ke la logiko tamen ne estas rigore obeata, kaj ke la gramatiko havas mankojn; klopodoj esprimi sin plejeble logike, kaj korekti la gramatikon; pasia, eĉ fanatika defendado de propraj eltrovoj; konstato, ke ankaŭ aliaj akiris simildajn spertojn, sed venis al aliaj solvoj; konsciiĝo, ke ne ĉiuj solvoj estas egale realigeblaj; kaj fine rezigno pri la realigebleco de propraj solvoj. En tiu lasta stadio ni konsciiĝas, ke niaj konceptoj fontis parte el niaj propraj sentoj, kaj ke ĉiuj niaj klopodoj finfine havis kiel precipan celon: veni al tiu ĉi rezigna konstato.

Ni fine ne povas ne konfesi, ke en sia gramatika kaj logike neperfekta stato Esperanto tamen estas bona, kaj ke ĉiuj neperfektaĵoj utilas al ni por akiri spertojn, por varmigi por la idealo kaj por fine lasi la samajn spertojn al niaj sekvantoj, kiuj trapasos la saman vojon kiel ni, sed kun la avantaĝo, ke ili povos utiligi al si niajn spertojn.

Tiu ĉi konstanta vojo de spertoj kaj instruoj daŭros, ĝis kiam Esperanto estos ĝenerale akceptita en la socia vivo. De tiu momento niaj personaj preferoj devos cedi al la ĝenerale agnoskitaj lingvaj formoj, ĉu ili kontentigos nin persone aŭ ne. De tiam la lingvo estos ligita al la samaj faktoroj kiel la naciaj lingvoj; kaj kiu eĉ tiam permesos al si aĝi laŭ personaj kapricoj, tiu same ridindigos sin kiel tiu, kiu manipulas sian nacian lingvon laŭ persona ĝusto, ĉar vivanta lingvo evoluas en la tuta popolo, sed ne estas direktebla nek decide influebla de la individuo.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

WEDERKERENDE BEZITTELIJKE VOORNAAMWOORDEN. IV.

Men heeft geleerd, dat „sia” ook betrekking kan hebben op het onderwerp van een verborgen handeling of toestand in een bijvoeglijk naamwoord; dit bijvoeglijk naamwoord is dan heel vaak een deelwoord. Ook bij een onbepaalde wijs kan sprake zijn van een onderwerp in de derde persoon waar „sia” betrekking op heeft, bijv.: *La instruisto ordonis al la knabo, fari* (= ke li faru) *sian taskon. Klaci* (= ke si klaças) *pri siaj najbarinoj, la virino tre ŝatas.*

Voornaamwoorden, die eindigen op „u” zijn derde persoon; men spreekt immers over iemand, bijv.: *Iu perdis sian monujon. Neniu timas sian hundon. Kiu el vi voĉleku sian verkajon?* De volgende zin leze men aandachtig: *Kiu el ni voĉlegu sian verkajon?* In deze zin beschouwe men niet „ni” als onderwerp, maar „kiu”. De vertaling van deze zin is: *Wie van ons leest zijn (eigen) opstel voor?* Voorts: *Kial vi, kiu tiom ŝatis sian grupon, ekŝiĝis?*

„Sia” doet dus dienst om het onderwerp in de derde persoon als de bezitter aan te wijzen. Het kan dus zelf niet in een onderwerp voorkomen. In een volzin kunnen meerdere personen, dieren of zaken als onderwerp dienst doen. Deze kunnen afzonderlijk genoemd zijn. Hebben deze betrekking op hetzelfde gezegde, dan vormen zij tezamen één onderwerp, bijv.: *La patro kaj la filo promenas.* Moet men vertalen: *De vader en zijn zoon wandelen in de tuin,* dan vertale men niet: *La patro kaj sia filo...* maar: *La patro kaj lia filo promenas en la ĝardeno,* want „lia filo” is een deel van het onderwerp. Men verwarre dit niet met een zin als: *La patro kun sia filo promenas en la ĝardeno.* Hier is „kun sia filo” geen deel van het onderwerp, maar een bepaling. In de zin: *La patro kaj lia filo promenas...* noemt men „la patro” en „la „filo” gelijksoortige zinsdelen; deze kunnen slechts met een voegwoord worden verbonden tot één onderwerp: „Kaj” is een voegwoord, „kun” is een voorzetsel.

Ter vertaling. Opgave 2.

De cursusleider raadde de cursisten aan,

goed hun lessen te leren. Kabe behoort tot de beste vertalers, zijn voornaamste vertaling is „La Faraono”, een prachtwerk. Dit boek bestaat uit drie delen. Wie heeft zijn hoed vergeten? Jan en zijn zuster konden hun vreugde niet verbergen. Jansen bezocht met zijn vrouw het congres in Parijs. De man zag niet, dat zijn zootje viel. Waarom neem je zijn boek niet mee? Ik weet niet, waar Jan zijn boek heeft gelegd; als ik het vinden kon, nam ik het zeker mee. De voorzitter sprak uitvoerig over Zamenhof en zijn werken.

Vertaling van opgave 12.

Jansen estas ĉarpentisto. Lia laborejo ne estas en lia 1) loĝdomo. Sinjorino 2) Jansen staras antaŭ sia pordo. Bonan matenon, sinjorino, ĉu la ĉarpentisto estas hejme? Ne, li estas en sia laborejo. Bedaŭrinde; Ĉu vi bonvolus 3), diri al li, ke mi venos 4) morgaŭ por peti 5) mian ŝrankon? Mi esperas, ke tiam ĝi estos preta. Ne havu zorgon 6), sinjoro, mia edzo konas 7) siajn klientojn. Charles Dickens estas fama aŭtoro; liaj verkoj estas ĉie konataj. Preskaŭ ĉiuj bestoj bone zorgas 8) por siaj idoj. La malgranda knabo perdis 9) la vojon en la urbo. Helpema 10) sinjoro kondukis lin al lia hejmo. La patrino de la malgranda knabo kore dankis la sinjoron pro lia helpo. Multaj homoj ne konas 7) sian propran landon. La instruistino punis la knabinon 11) pro 12) ŝia ne-atento 13).

1) Niet: *sia*; het onderwerp is „lia laborejo”, hier is dus geen sprake van bezit van onderwerp. 2) Niet: *la sinjorino Jansen*; voor een eigenaam wordt geen lidwoord gebruikt. De naam bepaalt de zelfstandigheid. 3) Niet: *ĉu vi dirus al li*; d.i. zou U hem zeggen? Ook: *bonvolu...* 4) Niet: *iros*. 5) Ook: *forporti, preni*. 6) Ook: *ne faru al vi zorgojn*. Niet: *senzorge*; d.i. onbezorgd. 7) Niet: *scias*; *scii* = weten, kunnen, *koni* = kennen. 8) Ook: *prizorgas siajn idojn*. 9) Niet: *estis vaginta*; d.i. had doelloos rondgezworven. 10) Ook: *helpopreta*. 11) Niet zonder N; men heeft hier met een rechtstreekse bepaling te doen. 12) Niet: *por*; d.i. ten behoeve van. 13) Niet: *sen-atento*; d.i. een onmogelijke vorm. Een voorvoegsel (hier is een voorzetsel als voorvoegsel gebruikt) geeft aan het grondwoord een gewijzigde betekenis, het samengestelde woord moet echter een

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zenden men in voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 2. Vertaal in Esperanto:

BOEKEN.

Boeken kunnen waarachtige vreugde geven, omdat zij ons leven wijder maken. Als de sleur en de zorgen van iedere dag ons beklemmen, dan kunnen boeken de wereld voor ons open maken.

In trage dagen zullen wij grijpen naar boeken, die ons meevoeren naar verre herinneringen, waarin koene zeevaarders de zeilen hijsen, waarin vurige paarden door de steppen draven, waarin moedige piloten de woestijnen en oerwouden overwinnen. In de trieste dagen zullen wij verlangen naar een boek, waarin de echte lach onze kleinheid overwint. In verwarrende dagen zullen wij zoeken naar een boek, waarin het leven tot een klaar en sterk beeld wordt. In dagen van droefheid is er een woord van vertroosting. In de dagen vol vragen is er een antwoord. Door alle eeuwen heen is er in boeken het zoeken en verlangen, het vinden en verliezen, het strijden en lijden van mensen vastgelegd. Mogen wij dan die schat voorbijgaan?

Vertaling van opgave 12.

Ĉirkaŭ 1) la vespero de tiu tago viro kaj virino rapide alvenis sur la vojo al Jerusalemo. Ili aspektis 2) tim(igit)aj 3) kaj maltrankvilaj 4), kaj al ĉiu(j), kiu(j)n ili renkontis, ili vokis 5): „Ni perdis nian filon. Ni supozis 6), ke li iras kun niaj parencoj 7) kaj (ge)najbaroj, sed neniu el 8) ili vidis lin. Ĉu iu 9) el vi survoje 10) preterveturis 11) infanon promenanta 12) sola 13)?” Tiuj 14), kiuj, venis el Jerusalemo, respondis: „Ni ne vidis vian filon, sed en la templo ni vidis ravan 15) infanon. Li 16) aspektis (kia) 17) ĉiela anĝelo kaj li trairis (la) Pordegon de (la) Justeco”. Ili volonte ekzakte rakontus ĉi tion, sed la gepatroj ne havis (la) tempon 18) (por) aŭskulti. Irante 19) longan distan-

con, ili renkontis aliajn homojn kaj demandis ĝin al ili.

Christus-legenden. S. Lagerlöf.

1) Iu tradukinto skribis: „„Apud” kun tempa senco mi, laŭ mia scio, en la literaturo ankoraŭ ne renkontis. Tamen, se la aliaj „horizontalaj” lokaj prepozicioj „antaŭ, post, en, ĉe, tra” estas uzablaj kun tempa signifo, kial „apud” estus neuzbla en tiu senco?” Ni opinias, ke la rimarko estas ĝusta. 2) Zamenhof gebruikte ook wel „elrigardis”, doch tegenwoordig wordt dit niet meer gebezigd. 3) „Aspekti” is een koppelwerkwoord. Hier volgt dus een bijvoeglijk naamwoord. 4) Ook: *malkvietaj*. 5) Ook: *demandis, kriis*. 6) Ook: *opiniis, pensis, kredis*. 7) Niet: *familianoj*. 8) Niet: *de*. 9) Beter dan „unu”. 10) Ook: *dumvoje*. 11) „Ook” zou kunnen worden vertaald door „eble”. 12) Niet: *sole*. La infano estas sola. 13) Dit deelwoord hoort bij „infanon” en heeft dus dezelfde naamval. 14) Niet: *ili, kiuj*. 15) Ook: *allogan, ĉarman, gloran*. 16) Ook: *ĝi*. 17) Niet: *kiel* (zie noot 2). Ook: *li estis kvazaŭ anĝelo el la ĉielo*. 18) Ook: *al la gepatroj mankis tempo*. 19) Ook: *kurinte*. Waarschijnlijk liepen zij wel hard.

Beoordeling: J. R. te A. 9; A. A. D. te Z. 8; Fr. A. S. te H. 7; A. J. G. te D. 8; J. J. B. te D. 8; H. J. H. te B. 8; C. J. P. te Z. 6; G. B. te Z. 7; F. v. d. M. te U. 7; F. B. R. te A. 7; J. S. te H. 8; H. H. te A. 9; E. R.-M. te S. 6; E. A. B. te A. 9; G. A. te R. 7; Astor 8; D. K. te A. 9; E. J. J. te A. 9; H. B. te Z. 8; H. J. H. te B. 9; E. R.-M. te S. 7.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Opgave 1.

Beoordeling: E. A. B. te A. 9; G. A. te R. 9; Astor 9; D. K. te Z. 8; J. J. te R. 6; J. P. v. D. 9; P. W. W. te G. 6; C. B. v. G. 8; Tilio 6; H. v. H. te E. 7; E. J. J. te A. 9; H. B. te Z. 8; H. J. H. te B. 9; E. R.-M. te S. 7.

begrip vormen. Dat doet het niet in bovenstaand geval; dit woord is geen compleet begrip. Wel kan men zeggen *senatanta homo*; het zelfstandig naamwoord maakt hier de uitdrukking compleet. Ook kan men zeggen: *senhejmulo*; het achtervoegsel „ul” completeert het begrip.

Beoordeling: Astor 9; G. A. te R. 10; E. A. B. te A. 10; D. K. te Z. 9; J. L. te R. 5; J. F. v. D. te A. 10; P. W. W. te G. 8; G. B. N. te Z. 8; J. A. V. te U. 6; A. J. G. te D. 9; J. J. B. te D. 9; D. V. H. 9; P. W. te Z. 7; Tilio 9; E. R. M. te S. 8; A. A. D. te Z. 8; C. v. B. te S. 7; A. B. te A. 7.

LA HOMA KORPO

B. Rijpstra.

LA SKELETO (Daŭrigo).

Kartilago, osto.

La pli multaj ostoj estas malmasivaj. Ĉe junaj infanoj la tuta skeleto estas masiva kartilago. Iom post iom ostoceloj anstataŭas kartilagon, kiu solviĝas post kalkiĝo. Por tio zorgas la periosto: fibrecna membrano ĉirkaŭ la osto kaj riĉa je sango-angioj.

En la osto estiĝas multaj kavoj (anfraktoj), kavetoj kaj kanaletoj. La interna granda kanalo kaj la pli grandaj kavoj entenas medolon: molan kaj grasan substancon, kiu servas kiel rezerva nutro. La medolo estas flava en la tubformaj ostoj, kaj ĝenerale ruĝa en la plataj ostoj.

Artiko kunigas du ostojn tiel, ke ili ambaŭ povas moviĝi. Unu el la du artikitaj ostoj havas kavon ĉe la fino; la alia havas kapon (fig. 13), tegitajn per daŭra kartilago. Elastaj ligamentoj kunligas la ostojn de artiko.

Sinovio faciligas la glitadon: ĝi lubrikas la artikon. Inter kavo kaj ostkapo ne troviĝas aero: la atmosfera premo tenas ekz. la tutan kruron en la kavo de la pelva zono.

Anfrakto = beenholte.

angio = bloedvat, lymphvat.

artiko = gewricht.

hipofiza foveo = holte in wiggebeen.

kartilago = kraakbeen.

lumbriki = smeren.

ligamento = ligament, fibreca ligajo, kiu kunligas ostojn aŭ altenas internajn korpartojn.

medolo = merg.

periosto = beenvlies.

sinovio = synoviaalmembraan.

trohlea foveo = holte in voorhoofdbeen.

MUSKOLOJ.

La muskoloj konsistas el karno, tra kiu iras sango kaj nervoj. La longaj ĉeloj formas fibron; fibroj formas faskon; faskoj formas muskolon.

Muskolo kiu kuntiriĝas, faras laboron. Antagonisto povas nuligi tiun laboron. Tendoj ligas muskolon al ostoj. Tendo konsistas el elasta, ne kuntiriĝebla histo kunliga.

Kelkaj muskoloj obeas la volon (ekz. en la membroj); aliaj funkcias nedepende (koro, sangotuboj, digestorganoj).

Graso inter la fibroj kaŭzas baldaŭan laciĝon.


Pro funkcio de muskolo estiĝas veneno; dum ripozo la sango forigas ĝin (ankaŭ masaĝo) (fig. 12).

Antagonisto = tegenstand(er).

fasko = bundel.

fibro = vezel.

tendo = pees.




1. fruntosto
2. parieto
3. okcipitosto
4. naza osto
5. etmoido
6. sfenoido
7. cerbo
8. cerebelo
9. kuniga cerbo
10. spina mjelo
11. trohlea foveo
12. hipofiza foveo

fig. 12



1. humero
2. ulno
3. radiuso
4. muskolo (biceps)
5. skapolo



1. vido
2. aŭdo
3. gusto
4. parolcentro
5. centro por laringo
6. langocentro
7. vizaĝcentro
8. movocentro por okuloj kaj
9. por la torso [kapo]
- 10-14. por la supraĵ membroj: ŝultro, humero, kubuto, karpeo, dika fingro, fingroj
- 15-17. por la malsupraĵ membroj: kokso, genuo, fingroj



fig. 13

1. osta kavo
2. osta kapo
3. femurosto

Ĉu vi jam pagis vian abonon? Se jes, dankon! Se ne, . . .

KIO OKAZIS ANTAŬ 1949!

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.

G. P. de Bruin.

(Daŭriĝo)

„Sennacieca Asocio Tutmonda“ (S.A.T.), kiu varbas siajn membrojn precipe inter laboristoj, kompreneble suferis pro la malfavora ekonomia kaj politika situacio, kaj do ne kreskis tiom, kiom ĝi povus en pli bonaj cirkonstancoj. Ke ĝi malgraŭ tio relative bonfartis kaj laŭ membronombro iom progresis, atestas pri la ofereco kaj idealismo de ĝia membraro.

La Jarlibro de 1949a enhavas adresojn de preskaŭ 6000 membroj en 41 landoj. Car inter ili troviĝas ankaŭ iuj, kiuj aliĝis en 1948a kaj ne restis en 1949a, la efektiva membronombro estis iom malpli alta. Ĝi estis komence de oktobro 5134; tio estas 124 pli ol unu jaron pli frue, kiam ĝi nombris 5010 membrojn.

La monata gazeto „Sennaciulo“ atingis eldonnombrom da proksimume 6000 ekzempleroj.

De la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto okazis en Parizo la 22a S.A.T.-kongreso. Partoprenis entute 1385 personoj el 15 landoj, inter kiuj ankaŭ el Algerio, Argentino, Brazilo, Bulgario, Finnlando, Islando, Portugalio kaj Usono. La unuan fojon post la dua mondmilito ĉeestis germanaj S.A.T.-anoj (la antaŭajn fojojn malhelpis pasportaj malfacilaĵoj), sed aliflanke pro la neeblo akiri permeson por elvojaĝo, povis partopreni neniu el la pli ol 100 ĉeĥoslovakaj S.A.T.-anoj kiuj aliĝis. La kongresproponoj plejparte koncernis proprajn organizaĵajn aferojn, escepte de tiu pri la lingva institucio de la movado. Oni akceptis rezolucion, en kiu oni konstatas, ke la nuntempa stato de la *Akademio* ne estas kontentiga laŭ organiza vidpunkto, kaj ke la plimulto el la nunaj akademianoj kontraŭas la eniron de kompetentuloj el la laborista Esperanto-movado.

Trifoje aperinta gazeto „Voĉo de l' kongreso, antaŭ kaj ĉe la kongreskomenco informis la partoprenantojn pri ĉio sciinda.

Ŝajnas, ke relative multaj kongresanoj ne ĉeestis la laborkunsidojn. Ĉi tiu fakto iom pravigas la proponojn, kiuj celas eviti la aliĝon de nesufiĉe seriozaj personoj. En la praktiko estas tamen ne facile malebligi tion. Taŭgan solvon por tiu problemo oni ankoraŭ ne trovis.

Ekster la oficialaj kunsidoj okazis prelegoj — kaj diskutoj — i.a. pri *La gesto de Garry Davis*, *La historio de S.A.T.*, *La kolonia problemo*, *Forto kaj malforto de la homaro*, *Magio hieraŭ kaj hodiaŭ*, kiuj estis lernigaj kaj instruaj kaj altiris sufiĉe da ĉeestantoj.

Cetere el la agado de S.A.T. estas menciinda la aperigo de la duvoluma „*Leteroj de Zamenhof*“ kaj la biografio „*Rosa Luksemburg*“, por kies eldono la S.A.T.-membraro pruntedonis kaj antaŭpagis sufiĉe grandan sumon da mono.

(Daŭriĝota)

„TIEL KE“ AŬ „PRO KIO“?

La traduko de la esprimo *zodat* per *tiel ke* fariĝis jam tiel kutima, ke oni ĝenerale ne rimarkas, ke *zodat* havas pli ol unu signifon. *Zodat* indikas konsekvencon de la antaŭstaranta propozicio, sed laŭ du manieroj:

1e. Se la antaŭstaranta propozicio akcentas ian gradon aŭ manieron, el kiu rezultas la ago en la dua propozicio, oni traduku per *tiel*...., ke: *La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi*, Z. Rimarku, ke en tiu ĉi kazo la esprimo estas aŭ duvorta (*zo*...., *dat*), aŭ facile dividebla en du: *zodat = tiel ke*.

2e. Se la dua propozicio simple mencias la sekvon aŭ rezulton de la unua, *zodat* signifas *waardoor, weshalve, vandaar*

dat, kaj la traduko estu *pro kio*: *La vojo estis barita de (per) arbo, pro kio ni ne povis daŭriĝi nian promenen*.

En ĉiu frazo kun *pro kio* ni povas uzi ankaŭ *pro tio*, sed nur post punktkomo aŭ punkto: *Pro tio (daardoor)*.... Rimarku, ke pro tiu ŝanĝo ankaŭ la nederlanda frazkonstruo fariĝas alia: *waardoor wij konden*.... — *daardoor konden wij*....

Atentu la diferencon inter *tiel ke* kaj *pro kio* en:

La vagonaro foriris tiel (tiom) malfrue, ke ni ankoraŭ povis atingi ĝin (zodat, dat).

La vagonaro foriris tro malfrue, pro kio ni ankoraŭ povis atingi ĝin (zodat).

OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

„Rilate al la artikolo 'Abio — piceo — pino' en L.P. de 15.1", informas nin s-ro Teo Jung, ke „laŭ la vortaro de Christaller Kiefer = *pino*, Tanne — *abio*, Weissstanne = *piceo*; laŭ la vortaro de Minor: *abio* = Tanne, *piceo* = Weissstanne, kaj *pino* = Fichte. Mi mem uzas *abio* = Fichte (la popolo kutime nomas ĝin 'Tanne'; *piceo* = (Weiss)tanne; *pino* = Kiefer.”

Tio montras, ke ankaŭ en la germana lingvo ne regas unueco de opinio koncerne la tri diskutitajn nomojn.

Samokaze ni korektu la nomon de „cypres”, kiu erare troviĝas en la koncerna artikolo. *Kupreso* d.e. *cipreso* (*Cupressus*).

Pri la refleksiva pronomo s-ro M. Arger en Paris skribas, ke li kun miro legis en L.P. de jan. la frazon, ke „gramatike 'kiu' indikas la trian personon”, kaj li daŭrigas: „Tio ĉi ne estas vero, almenaŭ ne en la franca lingvo. Ni konjugacias la verbon *esti* — „être” jene:

Je suis, kio iĝas en dependa propozicio: *moi, qui suis*.

Tu es: toi, qui es.

Il est: lui, qui est”, k.t.p.

„Do, la rilata pronomo „kiu” ricevas la personon 1an, 2an aŭ 3an laŭ la okazoj.”

Ni ne samopinias pri tio. Kvankam en la franca (kaj en la nederlanda) lingvo oni diras „moi, qui suis” (ik, die ben), do uzas unuapersonan verboformon ĉe „kiu” (triapersona pronomo), tio ne estas logika, sed formo nacilingva.

Esperanto ne konas apartajn verboformojn laŭ la personoj. Pro tio ni ne povas ĉi rilate kompari Esperanton kun aliaj lingvoj.

Vr.: Het is mij opgevallen, dat de laatste jaren een te ruim gebruik van „iĝi” wordt gemaakt. Is bijv. de zin „li elektigis prezidanto” goed te keuren?

Antw.: Inderdaad, ook ons is dit euvel opgevallen. Bizondere gevallen, die wij al besproken hebben, als „la libro legiĝas facile”, „ne rimarkate la mono elspeziĝis” willen wij buiten beschouwing laten.

Maar het is een fout ondoordacht de lijdende vorm met „iĝi” te vervangen. Uw voorbeeld: een voorzitter wordt gekozen, ondergaat dus de werking. De vertaling kan daarom alleen zijn „li estas elektata prezidanto”. Slechts in het volgende geval kunnen wij „elektiĝi” accepteren: Op een vergadering stelt niemand zich als voorzitter beschikbaar. hoewel door enige aanwezigen dezelfde persoon wordt

Sed pri la refleksivo validas la regulo, ke ĝi estu uzata, se la afero rilatas al la subjekto (gramatika aŭ — en nekompletaj dependaj propozicioj — logika). Sed ne ekzistas regulo, ke oni konsideru ĉe tio la personon de la ĉefa, do alia propozicio. Ni do diras korekte: *mi, kiu konfidas al sia amiko*; *vi, kiu rakontis tion pri si mem*. La strangajoj „mi — sia” kaj „vi — si” estas nur ŝajnaj, ĉar ne konformas al la naciaj lingvoj. Sed ne „mi” kaj „vi” estas subjektoj, al kiuj rilatas „sia” kaj „si”; subjekto en ambaŭ frazoj estas „kiu”. Oni do atentu la konformecon de „kiu — sia” kaj de „kiu — si”. „Kiu” estas triapersona, sendepende de la antaŭmetita 1a aŭ 2a persono.

Per tio ĉi supra ni tamen ne diras, ke „mia”, resp. „vi” en ambaŭ frazoj estas erara. Al aŭtoroj ni lasu liberecon en tio!

Fine s-ro Arger skribas: „Pro kio Baghy uzis 'sin'? Por skribi laŭ klara maniero Baghy devus konstrui la frazon jene: 'ĉu ludas komedion mi, kiu humiligante min....' Gramatike, se mi skribas '.... komedion, kiu', 'kiu' anstataŭas nepre 'komedion'.”

S-ro Arger pravas. Efektive la frazkonstruo de Baghy ne taŭgas. Tiaj konstruoj povas konduki al miskompreno, kaj plu: „Pro kio Zamenhof (en poezio 'En sonĝo princinon mi vidis....') skribis: 'Tenante sin koro ĉe koro'? (Oni presas nuntempe 'Tenante nin:'); Ĉar en la rusa lingvo nur unu refleksivo estas uzata, egale koncerne ĉiun el la tri personoj.”

Ankaŭ en tio s-ro Arger pravas. Sed tiu ĉi uzo de „sin” ne rilatas al la diskutita temo: refleksivo post „kiu”.

voorgesteld. Deze accepteert niet, maar wijst de functie ook niet af. Verder wordt er niet over gepraat, maar tenslotte constateert men, dat er wel geen keuze heeft plaatsgehad, maar dat de voorgestelde persoon de functie toch maar op zich heeft genomen. Nu kan men terecht zeggen: li elektigis prezidanto.

NEKROLOGO.

La 25an de dec. '49a mortis la edzino de nia multjara kunlaboranto k-do Lem. Al nia funebranta kamarado nian tutkoran kondolencon!

La fervoraj studentoj de la rubriko „De komencanto al progresanto” certe volonte indulgos al k-do Lem, ke li ĉi foje prokrastas sian instruan kontribuon.

DE WERKWOORDEN

AFGELEIDE WERKWOORDEN

5. Andere afgeleide werkwoorden.

Behalve de vele reeds genoemde afgeleide werkwoorden, bestaan er nog enkele, gevormd van andere woordsoorten en zelfs van voor- en achtervoegsels. Het aantal dezer afleidingen dat praktisch enig nut heeft, is gering.

Vermelden we eerst de afleidingen van bijwoorden: *adiaüi* (afscheid nemen, vaarwel zeggen), *fori* (weg of yeraf zijn), *kwazaüi* (doen alsof, zich houden als), *nei* (ontkennen), *plii* (meer-zijn, bovendien-zijn) en *troi* (overtollig, overbodig, te veel zijn). *Nei* en *adiaüi* zijn overgankelijk, de overige onovergankelijk en komen zelden voor.

Hoe we het woord *spiti* (weerstreven, trotseren, dwarsbomen, uitdagen) moeten opvatten, is niet met zekerheid te zeggen. Sommigen beschouwen *spite* als een voorzetsel (*spite io*), anderen als een bijwoord (*spite de io, al io*). Is het een voorzetsel, dan zou de afleiding niet *spiti*, maar *spitei* moeten zijn, omdat de *e*-uitgang dan tot de stam behoort en dus niet door een *i* te vervangen is. Is het een oorspronkelijk bijwoord, dan is dat eveneens het geval; die *e* behoort dan tot de stam, gelijk bij de bijwoorden *ne, ie, tie* e.d. De enig juiste oplossing ware de stam *spit'* als werkwoordelijk te beschouwen, waarvan *spite* een bijwoordelijke afleiding zou zijn. *Spite* is overgankelijk.

Van slechts drie tussenwerpsels worden werkwoorden afgeleid: *fii* (verafschuwen), *jesi* (beamen) en *vei* (weeklagen). Alleen *fii* en *jesi* zijn overgankelijk.

Werkwoordelijke afleidingen van voorvoegsels zijn vrijwel overbodig. Slechts zelden komen ze dan ook voor, en alleen in onovergankelijke zin: *eki* (een aanvang maken met) en *mali* (een tegenstelling vormen).

Wat de achtervoegsels betreft, *igi* en *igi* en het zelden voorkomende *adi* (vervolgen, voortgaan met) kunnen we eigenlijk niet als afleidingen beschouwen, omdat die achtervoegsels, tenminste *igi* en *igi*, een werkwoordelijke betekenis hebben. Anders is het gesteld met *ebli* en *indi*, afgeleid van achtervoegsels met een bij-

voeglijke betekenis. Beide afleidingen komen veelvuldig voor; vooral *ebli* wordt de laatste jaren graag gebruikt i.p.v. *esti eble* of *povi*. Maar daarbij wordt meestal vergeten, dat de achtervoegsels *ebla* en *inda*, en evenzo het niet-officiële *enda*, een lijdende betekenis hebben, geheel gelijk aan *ata*, *ita* en *ota*. Om dit goed te doen uitkomen plaatsen we de betekenissen van al deze achtervoegsels onder elkander:

ata = wat wordt ge....

ita = wat is ge....

ota = wat zal worden ge....

ebla = wat kan worden ge....

enda = wat moet worden ge....

inda = wat waard is te worden ge....

Hieruit volgt, dat, indien men deze achtervoegsels als werkwoorden gaat gebruiken, de lijdende betekenissen daarin vervat niet verloren gaan, maar bestaan blijven, zodat men niet gedachteloos mag zeggen: *li eblas fari tion; eblas, ke tio okazos; cu li ne indas helpi vin* e.d. Integendeel, bij het toepassen van *ebli* en *indi* moet men beider passieve betekenis in het oog houden, d.w.z., uit de bepaling die eventueel op *ebli* en *indi* volgt, moet blijken, dat de werkwoorden betekenen: *wat kan worden gedaan, respectievelijk: wat waard is te worden gedaan*. En, komen *ebli* en *indi* in korte zinnen zonder bepaling voor, dan moet ook de bij te denken bepaling aan de lijdende betekenis van het werkwoord aansluiten. Zegt men bijvoorbeeld kortweg *tio eblas*, dan moet de betekenis daarvan zijn: *tio eblas esti farata*, maar nooit: *tio eblas fari* of *okazi*.

Het spreekt wel vanzelf, dat werkwoorden met een zodanig karakter onovergankelijk zijn, niettegenstaande P.V. *indi* overgankelijk noemt, blijkbaar uit hoofde van het feit, dat na *indi* vaak de 4e naamval voorkomt (*indi ion*), die dan natuurlijk geen lijdend voorwerp is, maar als een 4e naamval ter vervanging van het voorzetsel beschouwd moet worden (*indi je io*).

Een graag gebruikte afleiding is *emi* (geneigd zijn).

(Slot volgt.)

WERFT ABONNE'S VOOR

„LA PROGRESANTO”

